

Flandra **ESPERANTISTO**

TIJDSCHRIFT VOOR ESPERANTO-ONDERWIJS EN-PROPAGANDA

Orgaan van de **VLAAMSE ESPERANTISTENBOND, St. Klaradreef 59, BRUGGE**

Postrekening 2321.50 van V. E. B. Raapstr. 74, Gent

Verschijnt maandelijks
Drie en twintigste jaarg.
Nummer 7/8 (262)
JULI-AUG. 1956

LIDMAATSCHAPSGELDEN:
Leden: 100 F (met inbegrip van het bondsorgaan)
Steuleden: 150 F (idem)
Inwonende leden: 25 F (met inbegrip van „De Esperantist“)
Jongeren (onder de 21 jaar): 50 F

ABONNEMENTEN:
België: 75 fr.
Ceteraj landoj: 75 bfr.
Proefn.: 5 fr. (1 r.k.)

Niaj amikoj skribis . . .

En Francujo ekzistas forta movado por dulingvismo, kiun multaj, tre multaj, eble tro multaj konsideras necesa kaj tiel neevitebla. Ĉi tiu konvinko estas nepra konfeso, ke Francujo estas perdanta sian spiritan mondpotencon aŭ jam perdis ĝin. Ĝis antaŭ nelonge la francoj ne sentis la bezonon lerni fremdan lingvon kaj la francoj estis devigataj en propra intereso lerni la francan lingvon.

Kiam iu lingvo pro diversaj cirkonstancoj kaj la ludo de la potenco disvastiĝas en la mondo, la sekvo estas, ke la kulturo de la popolo, kiu parolas tiun lingvon nerezisteble trudas sin al la mondo. Ĉar lingvo ne estas nur teknika esprimilo;

ĝi estas nedisigeble ligita kun ĉiuj, kaj precipe la plej profunde kaŝitaj kaj do plej esencaj vivmanieroj de la popolo, kiu kreis ĝin kaj uzadis ĝin dum jarcentoj.

„La lingvo estas la tuta popolo”, diris la flandra poeto Guido Gezelle. Kiu do akceptas fremdan lingvon, akceptas la tutan fremdan popolon.

Ne estas eble legi iun ajn lingvon, sen ke, kelkfoje multe, kelkfoje malmulte, sed ĉiam io kaj io esenca de la popolo, kiu parolas tiun lingvon, transiras en nin.

Se la propagandistoj de deviga, plene enkondukita dulingvismo sukcesos, Francujo perdos por ĉiam grandan parton de sia neanstataŭigebla personeco kaj en la daŭro ĝi fariĝos identa kun la anglosaksa bloko.

Kaj ĉar la monda potenco havas profundan influon sur la evoluo de la spirita vivo, la rezulto de bone organizita dulingvismo, se oni konsideras la politikajn interrilatojn, estos amerikaniĝo de Francujo. La perdiĝo de iu karaktero estas ĉiam katastrofo, sed laŭ mia opinio ne estas pensebla pli granda katastrofo ol la degenero de la franca spirito. Oni multe parolas pri la okcident-eŭropa kulturo. Kiam ĝi estas minacata, nur tiam

oni klare vidas ĝian valoron. Sed la kerno de la okcident-eŭropa kulturo finfine troviĝas en Francujo. Mi volas eĉ pli akcenti tion; ĉiuj okcident-eŭropaj landoj, kiujn ni rigardas kiel kulturfaktorojn, estas variaĵoj de unu temo, kiu nomiĝas Francujo.

En la dekoka ĝis la deknaŭa jarcento Germanujo estis trapenetrita de la franca fermento. Kiam oni tie perforte transformis la patrujamon en envian kaj senhoman naciismon, oni sukcesis liberiĝi de la franca influo. Kaj la fina rezultato estis la bruta fiero de Vilhelmo, kiu neeviteble devis finiĝi en la katastrofa barbareco, kies neniigan laboron ni vidis de tre proksime.

Se oni perforte kaj nepre postulas dulingvismon, tiam ekzistas laŭ mi nur unu akceptebla solvo: oni elektu kiel duan lingvon tian lingvon, kiu ne estas ŝarĝita per la animo kaj la spirito de fremda popolo.

La devizo de Guido Gezelle por Flandrujo estas aplikebla al ĉiuj lingvoj. Ĉiuj lingvoj estas la tuta popolo, el kiu ili naskiĝis.

Restas do nur unu ebleco: la akcepto de artefarita lingvo. Kaj kial ne? Artefarita Lingvo, kiu respondas al ĉiuj postuloj de la ĉiutagaj interrilatoj de la nacioj, estas libera de ĉiu ŝarĝo. Ne estas ligitaj al ĝi memoroj, sentoj, heredaĵoj. Ĝi estas malsepsa, intelekta kaj celtrafa. Mal-longe dirite, ĝi estas nenio pli, sed ankaŭ nenio malpli ol sobra, klara helpilo. Ĝi ne havas historion, ne sekreterojn, ne surprizojn. Ĝi ne havas fonon, nek ambicion kaj ĝi ne estas subigita al politiko, animstato aŭ deziroj. Ĝi estas ilo. Krom tio ĝi havas la avantaĝojn de simpleco kaj klareco, tiel ke oni povas en plej mallonga tempo uzi ĝin.

Se oni en la tuta mondo redaktus ĉiujn ŝtatajn dokumentojn, tagjurnalojn kaj komercajn korespondaĵojn en unu sama artefarita lingvo, liberiĝus nekalkulebla kvanto da tempo

Universala Kongreso 1957

Ni eksciis, ke la estraro de U.E.A. decidis okazigi la 42-an Universalan Kongreson la venontan jaron en MARSEILLE, Francujo.

kaj energio, kiu povus esti uzata por pli atente studi la naciajn lingvojn kaj tiamaniere pliriĝi ilin kaj igi ilin pli flekseblaj kaj ĉiam pli nuancitaj.

Se la francoj iam cedus al tiu malinda stulteco por akcepti la anglan lingvon kiel ĝenerale devigatan duan nacian lingvon, la sama angla lingvo — tio ne estus evitebla — difektus la francan lingvon malrapide, sed certe, kaj farus ĝin nerekoncible. Jam nun, kiam la angla lingvo ankoraŭ tute ne estas la oficiala dua lingvo en Francujo, nek en Nederlando, oni rimarkas ĝian influon ĉie kaj ĉiutage.

Jam nun la angla lingvo, same kiel la ĝemela amerika lingvo, estas funde difektanta la lingvojn de okcident-Eŭropo.

Multa bono estas en la ideo de internacia esprimilo, sed je ĉiu prezo ĝi estu neŭtrala, principe nepersona, pure teknika lingvo. Neniu profitos, kiam li akceptos en sia domo, en sia spirito kaj eĉ en sia animo per la angla gramatiko kaj vortaro, la malnovegan anglan civilizon kaj la tipan anglan popolkarakteron.

Kiu trinkas akvon ĉie en la mondo kontentigas sian soifon per H₂O. Kiu trinkas francan vinon, trinkas Francujon. Kiu uzas artefaritan lingvon estas celtrafe helpata de formulo. Kiu parolas la anglan lingvon, manĝas kaj trinkas Anglujojn kaj enspiras Amerikon. Ke ni apliku, kiel faras multaj francoj, la nunan strofon de la luksemburga himno al ni mem: „Ni volas resti, kiuj ni estas”.

J. G.

(Verkita en nederlanda lingvo de fama nederlanda verkisto. Jan Greshoff. Aperis en la granda taggazeto „Het Vaderland” 31 marto 1956.)

(El Franca Esp-to)

La esperantistaro kaj problemoj de la sciencistoj

En ĉi tiu artikolo mi deziras atentigi pri kelkaj problemoj, antaŭ kiuj nun troviĝas sciencistoj-esperantistoj, — problemoj, pri kiuj ankaŭ larĝa esperantista popolo devas interesiĝi, kaj kontribui al ilia solvo. Krom plejble objektiva traktado de la problemoj, mi donos ankaŭ kelkajn proponojn, por ke oni pridiskutu ilin larĝe kaj tiel trovu plej bonan solvon.

Esperantistoj-sciencistoj estas kolektitaj en ISAE (Internacia Scienca Asocio Esperantista), kvankam oni devas tuj menciigi ke multaj esperantistoj-sciencistoj estas ankoraŭ ekster ISAE kaj, kontraŭe, en ISAE troviĝas ankaŭ nesciencistoj (sed kiuj multe interesiĝas pri scienco). Post la rezolucio de Unesco antaŭ ISAE staras unu el plej gravaj taskoj de la Esperanto-movado: komenci pli rapide kaj pli serioze penetradon en la sciencoj. Scienco ja estas la kampo sur kiu Esperanto povas plej multe helpi al la homaro (nur kiam koncernaj instancoj akceptos la helpon!) Ĉu nia movado estas preta efektiviĝi, serioze kaj komplete, la taskon?

Al la supra demando oni povas respondi nur negative. Jen kial. Imagu ke kelkaj internaciaj sciencaj unioj, kiel kunlaborantaj organizaĵoj de Unesco, decidis morgaŭ eldonadi internaciajn sciencajn revuojn en Esperanto. Ni ne havos sufiĉan nombron da esperantistoj por regule disponigi al la revuoj originalajn sciencajn verkaĵojn, eĉ ne sufiĉe por rapide kaj perfekte traduki verkojn de aliaj. Krome la terminologiaj demandoj baros eldonadon de revuoj, ĉar miloj da literaturaj verkoj perfektigis la lingvon, sed miloj da sciencaj Esperanto-libroj ankoraŭ mankas, kaj tiurilate la lingvo estas ankoraŭ neperfekta.

Signo de tia stato estas la revuo eldonata de ISAE, ĝia oficiala organo „Scienca Revuo”. Kvar numeroj jare po 40 paĝoj! Ĉu tio ne estas modeste amplekso por nia movado? Kaj eĉ tia modesta revuo havas malpli ol 500 abonantojn en la tuta mondo! Estas tre serioza demando, pro kio tiel staras la afero, grava demando ne nur por sciencistoj, sed por la tuta Esperanto-popolo. Ne temas pri malbona revuo. Kontraŭe — la revuo estas tre bone redaktata kaj la artikoloj estas tute kontentigaj. Do kial? Mi provos objektivigigi la situacion. La eldonisto (Muusses en Nederlando) havas ĉiam financon perdon, kaj li ne deziras havi plian perdon per pliampleksigo de la revuo. La redaktoroj plendas, ke ili ne havas kunlaborantojn: artikoloj estas mal-

bone skribitaj, ofte lingve ne tre perfektaj. Kaj la legantoj ne aĉetadas la revuon: ŝajnas, ĉefe, ĉar ĝi estas multekosta (kompare kun aliaj revuoj) pro malgranda eldonkvanto. Ili ĉiuj pravas de sia vidpunkto, sed kiel staras la afero de ĝenerala vidpunkto? Mi diros mian opinion kaj ĝuste tio estas unu el la demandoj, pri kiu oni devas aŭdi la esperantistojn, kiuj devus legi tiun revuon kaj tamen ne abonas ĝin.

Mi opinias, ke la ĉefa afero estas en la enhavo de la revuo. La artikoloj en ĝi estas bonaj, interesaj kaj utilaj, sed estas maloftaj artikoloj interesaj por ĉiuj legantoj. Homoj vivas hodiaŭ plej multe en faka sfero, ilin ĉiujn plej multe interesus artikoloj el propra fako kaj el ĝiaj parencaj fakoj. Nin fervorajn esperantistojn iomete pli interesas sociaj kaj lingvaj problemoj; sed ne forgesu, ke nia movado ne plu konsistas nur el fervoraj esperantistoj. Pro tio mi opinias, ke scienca Esperanto-revuo havus multe pli da abonantoj, se ĝi estus faka revuo, kondiĉe nur ke ĝia scienca nivelo ne estu tro alta. La lasta kondiĉo devas esti, ĉar ni ankoraŭ ne havas multajn fakulojn en ĉiu fako. Tial la fakaj revuoj, kiajn nun bezonas la Esperanto-movado, devas havi tre varian fakon *enhavon*: popularsciencaj artikoloj, novaĵoj el parencaj fakoj, lastatempaj sciencaj atingiĝoj (eĉ resumoj aŭ tutaĵ tradukoj pri la plej gravaj eltrovaĵoj), terminologiaj problemoj, respondoj al demandoj de la legantoj ktp. Kun tia enhavo la gazeto rapide disvastigus siajn radikojn en vasta Esperanto-popolo, kie ĝi trovas firman bazon por plua kresko. Se vi ne samopinias, bonvolu klarigi vian opinion!

La supran opinion mi diskutigis inter la estraranoj de ISAE kaj dum la kongresa ISAE-kunsido en Bologna. Ĉefa kontraŭargumento estis la timo, ke tia gazeto ne povus finance elteni longe. La kongresa kunsido tamen decidis fari paŝon antaŭen: dividi la nunan revuon en du branĉojn: sociistorian kaj natursploran, tiel ke alterne aperu numeroj de ambaŭ branĉoj. La membroj de ISAE ricevadus ambaŭ branĉojn, kaj aliaj povus aboni nur unu branĉon. La estraro de ISAE konsentis la decidon, sed la eldonisto kaj la redaktoroj ne tute konsentis. Ili proponis aperigadon (en Jugoslavio aŭ Ĉeĥoslovakio) de aparta natursplora revuo kaj ke la nuna revuo daŭrigu kun nur lingvaj kaj sociaj problemoj. Certe oni povas ankaŭ tiel efektiviĝi la decidon de la kongresa kunsido, sed nun estas tro malfrue

por organizi tion, pro kio por la nuna jaro devis resti la ĝisnuna stato. Sed ĉar ni havas ankoraŭ iom da tempo ĝis la ĉi-jara kongreso, ni povas pli detale kaj pli publike pridiskuti ĉiujn eblecojn.

La ĝisnuna diskuto jam klare montris, ke ni bezonas almenaŭ du diversfakajn revuojn. Sed ĉu ni kontentiĝu kun tia divido, aŭ ni iru plue? Ĉu nia movado ne povus elteni apartan teknikan revuon? Biologian? Lingvistikan? Ekzemple mi estas preta partopreni la redaktadon de artikoloj el astronomio, fiziko kaj matematiko (sub titolo, ekz., „Universo”, „Mondego kaj mondetoj”, aŭ simile). Tio dependos plej multe de la interesiĝo de esperantistoj. La estonta vojo certe estas tiudirekta, sed kion fari kiel la komencan paŝon: ĉu du aŭ pliaj gazetoj? Mi petas pridiskuti la demandon (kaj diskutigi ĝin en la kluboj) kaj doni siajn opiniojn.

Kio koncernas la financon flankon, mi scias, ke ĉiu komenco estas malfacila. Sed laŭ mia konvinko nur la komenco; ĉar mi estas certa, ke la fakaj revuoj rapide enradikiĝos en nia publiko. Ekzistas eĉ multaj fakaj bibliotekoj, kiuj aĉetas ĉion fakan, senkonsidere pri la lingvo. Mi estas certa, ke la esperantistaro multe abonos fakajn revuojn (kompreneble se la enhavo estas interesa kaj science ne tro altnivela). Mi ne parolas tion fantazie, sed laŭ propraj spertoj. Dum kvar jaroj mi sukcesis, kun helpo de aliaj ISAE-anoj, en Jugoslavio kreskigi la abonantaron de kvin al 40, por tia Scienca Revuo kia ĝi nun estas! Kaj kiam ni en malgranda lando (ankoraŭ malriĉa kaj kun nelibera monŝanĝo povas atingi preskaŭ dekonon de la abonantaro, en aliaj landoj certe oni povas fari pli multe. Mankas do pli larĝa propagando, kaj komence ni rajtas postuli de ĉiu fervora esperantisto propagandi amase abonon de fakaj revuoj.

Mi iras eĉ plue kaj mi diras, ke sur la nuna ŝtupo de la movado ni bezonas kreon de speciala fondaĵo por evoluigo de scienca internacia lingvo. El tiu fondaĵo oni helpus eldonadon de fakaj revuoj kaj viziton al neesperantistaj sciencaj kongresoj (pri kio mi parolos poste). La esperantistaro montris sian konsciecon, kiam ĝi kreis fondaĵon „Montevideo” kaj ebligis nian grandan venkon. Same okazos certe kun fondaĵo „Scienco”. Mi petas tralegi ankaŭ la sekvantan parton kaj tiam doni vian opinion ankaŭ pri tia fondaĵo.

Nur per tia vojo ni povas krei reton de sciencaj rondoj, kiuj flegos la sciencajn lingvon, kaj sciencistojn-esperantistojn. Sen tio ni neniam kapabliĝos por fakta penetro de nia lingvo en sciencajn rondojn de la mondo.

Mi deziras nun transiri al alia demando, ege ligita kun la revua deman-

do. Nome iam oni erare kontraŭas la suprajn pensojn per diro, ke ni povas penetri en la sciencan nur per aktiva laboro de unuopaj esperantistoj-sciencistoj en neesperantistaj sciencaj rondoj, precipe per verkado en Esperanto por sciencaj gazetoj neesperantistaj. Mi konsentas, ke tio estas grava vojo por atingo de la celo. Jugoslavia sekcio de ISAE eĉ faris specialan cirkuleran leteron al sciencistoj kaj sciencaj institutoj en Jugoslavio. Tio estas grava, sed ne la sola vojo. Eĉ kiam ni verkas en Esperanto, ofte estas neeble penetri en neesperantistajn sciencajn revuojjn. Krome tiuj revuoj povas nur akcepti aŭ rifuzi la verkaĵojn, sed ili ne povas flegi la lingvon kaj kreskigi niajn sciencistojn. Por tiu celo ni nepre bezonas ankaŭ Esperantajn fakajn revuojn.

Sed kiel plifaciligi la penetron de Esperanto en neesperantistajn sciencajn revuojn? Ankaŭ pri tio mi diros mian opinion, por ke oni pridiskutu ĝin. Mi opinias, ke dum Universalaj Kongresoj ni tro malmulte da tempo dediĉas al sciencaj demandoj. La esperantistoj-sciencistoj plej multe eĉ ne vizitas la kongresojn. Kaj ili devas pli ofte kunsidi kaj preparoli komunajn demandojn. Tie ekzistas tri eblecoj: kunvenado dum Universalaj Kongresoj, same dum neesperantistaj sciencaj kongresoj, kaj organizo de sciencaj Esperanto-kongresoj. Ĉiuj ebleco havas sian avantaĝon, kaj mi opinias, ke oni devas kombini ilin. Unua ISAE devas organizi kunvenadon de esperantistoj dum internaciaj sciencaj kongresoj kaj ilian konkordan agadon dum la kongreso. Sed por ebligis tion, *esperantistoj-sciencistoj devas kunveni ankaŭ aparte*. Organizis ilian specialan kongreson estas preskaŭ neeble. Pro tio mi proponas, ke oni organizu ilian kongreson *paralele kun la Universala Kongreso* — jam en Kopenhago. Ni povas tie dum kelkaj kunsidoj pritrakti generalajn kaj organizajn demandojn. Ĉiu venonta kongreso povas esti dediĉata al apartaj demandoj *el nur kelkaj parencaj sciencoj*, tiel ke esperantistoj-sciencistoj ne devas ĉiujare vizitadi la kongreson (ĉar ili tion eĉ ne povas). Mi aldonu ankoraŭ ke la sciencaj kongresoj devus transpreni ankaŭ la *prelegojn de ISU*, organizi ilin kaj publikigadi ilin tuj post la kongreso en la koncernaj fakaj revuoj. Tio estus kontakta punkto inter Universalaj kaj sciencistaj kongresoj. Sed aliflanke multaj nesciencistoj havas eblecon viziti ankaŭ la sciencajn kunsidojn; same la sciencistoj havas eblecon viziti plej interesajn generalajn kunvenojn. Ĉu vi ne samopinias?

Sciencaj Esperanto-kongresoj ebligas planan kaj laŭsisteman agadon de esperantistoj-sciencistoj dum internaciaj sciencaj kongresoj. Ili devas tie

esti pli multnombraj. La menciita fondaĵo „Scienco” ebligus al *eminentaj esperantistoj-sciencistoj* (kiuj montriĝis kapablaj kaj kiel sciencistoj kaj kiel esperantistoj) ĉeesti la kongreson, se ili ne havas alian eblecon por tio. Kompreneble, laŭsistema agado postulas, ke oni ne disjetadu la fortojn, sed koncentru ilin al tiuj kongresoj, kie oni povas atendi plej grandan sukceson.

Jen la problemoj gravaj por ni ĉiuj, ne nur por sciencistoj, ĉu ne? Sciencistoj devas esti portantoj de la taskoj, sed sen helpo de la tuta esperantistaro ili certe estos senpovaj. Kaj eĉ ofte ilia propra intereso ne estas en tiu direkto, ĉar ili kutime jam konas plurajn lingvojn, sed ili tion faras por nia komuna celo. Pro tio ili rajtas postuli helpon de la esperantista popolo. Mi estas certa, ke ni kune sukcesos. Ni unue *serĉu kune la vojon!* Oni ne devas konsenti kun ĉio dirita, sed kune serĉi plej bonan vojon. Jen, bonvolu, ke ni serĉu ĝin kune!

Prof. B. POPOVIC,
ĝen. sekretario de ISAE
(kaj komitatano de UEA).

(El Heroldo 1/6/56).

Pli bona kompreno per trimonta Esperanto ol per trijara angla inter sveda kokimbredisto kaj japana seksdistingisto

Japanaj specialistoj pri seksdistingado je kokidoj atingis dum la lastaj jaroj internacian famon. Jam kiam la kokidoj havas aĝon de nur 24 horoj, la japanaj specialistoj povas distingigi ilian sekson kun certeco de 98%. La specialistoj estas sendataj en diversajn landojn por sezona laboro, kaj tiun aferon organizas ilia faka organizaĵo en Japanujo kaj agentoj en la koncernaj landoj.

En Svedujo posedantoj de grandaj kokimbredoj jam dum kelkaj jaroj uzis la servojn de tiuj japanaj specialistoj, kaj dank' al kuraĝa iniciato kaj persistemo de japana redaktoro, S-ro Isobe, kaj s-ano Carl Erik Carlsson, kokimbredisto en St. Levene, Svedujo, unu el tiuj ĉi-jare alvenintaj estas esperantisto.

Efektive S-ro Etushi Kyuhara komencis lerni Esperanton nur tri monatojn antaŭ sia alveno en Svedujo en januaro, kaj la eklerno de Esperanto estis la kondiĉo, por ke li rajtu veturi al Svedujo. S-roj Isobe kaj Carlsson nome unue intencis venigi spertan esperantiston; sed kiam montriĝis, ke tia ne troviĝas inter la organizitaj japanaj specialistoj, ili tutsimple igis kelkajn lerni nian lingvon. Malgraŭ la mallonga studotempo S-ro Kyuhara, laŭ propraj asertoj, jam pli

facile interkompreniĝas per Esperanto ol per la angla lingvo, kiun li studadis dum tri jaroj. Ni opinias, ke la afero estas atentinda Imagu, ke tiu forta japana fak-organizo — same kiel, cetero, la sveda agento — nun estas atentigita pri la fakto, ke en Svedujo oni deziras specialistojn, kiuj parolas ne la anglan sed Esperanton! Imagu, se en aliaj landoj, kiuj „importas” japanajn seksdistingistojn, oni sekvas tiun ekzemplon! Se io kondukos nin al la venko, tiaj pruvoj pri la praktika utilo de Esperanto devas konduki nin en tiu direkto. Atentu, ke tiuj japanaj specialistoj ĝenerale maniere la anglan lingvon en mizera maniero kaj malfacile interkompreniĝas per ĝi.

(El Heroldo 1/6/56)

Teknista praktikado en Svedujo

Studento de teknika gimnazio aŭ faklernejo estas invitata por 8-semajna praktikado (aŭgusto-septembro) ĉe moderna sveda aŭto-industrio (motorfabriko). Bona okazo por esperantisto-teknikstudento, kiu ankaŭ ricevos certan salajron por la praktikperiodo. Kontakto kun lokaj esperantistoj faciligos la restadon en Svedujo. Eventuale esperantisto povas ricevi laboron konstantan en la sama uzino, se li estas lerta maŝinlaboristo aŭ riparisto kun bone dokumentita metiista scio. Ofertojn sub „Svedujo 956” peras la redakcio de Heroldo.

ĈU ĴALUZO ?

Ĉe la finiĝo de la 6-a kongreso de la Internacia Federacio de profesoroj de vivantaj lingvoj, okazinta, de la 4a ĝis la 6a de aprilo, en Amsterdam, kunigante delegitojn el 17 landoj, rezolucio estis aprokata, esprimanta la deziron ke Unesko interesiĝu pri la problemo de la instruado de vivantaj lingvoj. (kompreneble multege multenombre!)

La rezolucio deziras ke Unesko kuraĝigu ĉiurimede la komparon de la diversaj instru-metodoj por vivantaj lingvoj aplikataj en la mondo kaj ke ĝi organizu, kunlabore kun la Internacia Federacio de profesoroj de vivantaj lingvoj, kunvenon de eŭropaj specialistoj pri instruado de vivantaj lingvoj kun iliaj kolegoj el aliaj mondpartoj. La kongreso estis patronata interalie de la ministroj belga kaj nederlanda por instruado.

Ĉu vere la profesoroj de vivantaj lingvoj, kiuj grandplimulte malestimas kaj eĉ kontraŭbatalas la laŭ ili „mortnaskitar” Esperanton, tamen vidus en ĝi tiel danĝeran konkuranton, ke ili ĵaluzus ĝiajn sukcesojn ĉe Unesko?

Sa Pu Pej.

NED. ESPERANTISTEN-VEREN. „LA ESTONTO ESTAS NIA”

Alg. Secretariaat, schriftelijke cursussen en uitleendienst:
 Mej. A. C. H. van der Beek, P. C. Hooftstr. 90, Amsterdam-Z.
 Penningm.: B. J. J. Albers, Olympiaweg 69^{III}, Amsterdam-Z. Postrek. 34563.
 Adm. Ned. Esp.: P. M. Mablesone, Pythagorasstr. 122, Amsterdam-O.
 Boekendienst: S. Mablesone, Pythagorasstr. 122, Amsterdam-O. Postrek. 76915,
 Bibliotheek: E. A. Koot, Joh. de Meesterstraat 12, Utrecht.
 Propaganda-dienst: H. Bakker, Van Tuylplein 33/1, Amsterdam-Zuid, tel. 95320.
 Alg. Ned. Esp. Examen-comm.: Mej. H. M. Mulder, Zilvermeuwstr. 29 Badhoevedorp
 Cefdel. U.E.A.: J. Telling, Schietbaanlaan 106, Rotterdam. Postrek. 242619.
 Vic-ĉefd. F. Weeke, Zwolseweg 172 A, Diepenveen. Postrek. 822075.

Lingva Simposio

(Arnhemo 16—19 majo 1956)

Laŭ iniciato de la fondaĵo „Arnhem-Eŭropo” okazis la supre nomita simposio en kiu oni pritraktis la malfacilaĵojn estiĝantajn pro la lingva diverseco en Eŭropo. La programo de la konferenco estis tre ampleksa kaj pro tio ne ĉiam estis sufiĉe da tempo por detale pritrakti la diversajn temojn. Ĉeestis proksimume 130 partoprenantoj inter kiuj multaj lingvaj spertuloj.

La prelegoj okazis en la franca aŭ angla lingvo kaj estis helpe de tradukistoj kaj la konataj aparatoj kun mikrofonoj kaj kapaŭdiloj tradukitaj aŭ en la angla kaj germana aŭ en franca kaj germana lingvoj, sed bedaŭrinde la aparatoj ne bone funkciis kaj rezulte de tio oni povis aŭdi la tradukon nur en unu lingvo. Ni mem spertis kiel malfacile kaj ĝene estas dum longa tempo aŭskulti per tiuj kapaŭdiloj. Prezidanto de la konferenco estis Mag. J. J. Schokking, prof. pri la internacia juro privata en la universitato en Kolonjo. La parolintoj estis Prof. D. ro Schalk, direktoro de la itala instituto ĉe la universitato en Kolonjo; D. ro Hahn, eksĉefo de la tradukservo de la Kortumo de Justico ĉe la Komunumo de Karbo kaj Ŝtalo; Mag. D. ro Reyersom de N.A.T.O.; S. ro M. Henry de la franca aertrafiko; S. ro M. Spira de la eŭropa lernejo en Luksemburgo; Père Willot S. J. inspektoro de dulingvaj lernejoj en Bruselo; Mag. Elliott de eduka instituto ĉe la Londona universitato; Prof. Collinson el Liverpool; S. ro A. Konig, Overveen, Nederlando; S. ro M. Lévy, direktoro de la informa servo ĉe la Eŭropa Konsilantaro kaj ankoraŭ kelkaj aliaj. La esperanto-movadan reprezentis i.a. Prof. Collinson, Prof. Lapenna; Mag. S. Pragano; D. ro Makink; D. ro Roelofs; D. ro Ing. Hamming; S. ro Cseh, F. ino M. Vermaas; S. ino Isbrücker, S. ro R. van Spronsen, S. ro v. Haren, S. ro F. Weeke Prof. Schalk donis historian superriardon pri la evoluo de universala lingvo (la latina) al naciaj lingvoj kaj kiel tiuj naciaj lingvoj siavice fariĝis universalaj sed sur pli limititaj teritorioj. Li konkludis ke ĝusta

Uitslagen van het Esperanto-examen Amersfoort, 22 Mei 1956*E-examen:*

Aangemeld 30 kandidaten, opgekomen 29, geslaagd 21.

C. C. H. Zee-de Jonge, Amersfoort; L. van Dijk, R. C. Groeneveld, Amsterdam; G. H. van Dodewaard, Arnhem; J. Benz, L. F. Brassem, R. v/d Outenaar, M. Prior, H. F. Visser, Haarlem; C. Boschman, Krommenie; H. Groot-Kraan, Purmerend; B. Deichman, J. de Ligt, Rotterdam; M. J. van Leeuwen-v/d Linden, Utrecht; T. S. Kho, Voorburg; J. Dik, Wormerveer; O. Hoekstra, J. H. Hoekstra-Sieders, J. Schone-Slot, Zaandam, A. J. W. H. Drost, J. E. C. Koot, Zeist.

M-examen:

Aangemeld 3 kandidaten, opgekomen 3, geslaagd 2.

J. Kuipers, Sappemeer; C. P. Westerveld, Amsterdam.

S-examen:

Aangemeld 5 kandidaten, opgekomen 4, geslaagd 3.

H. J. van Denzen, Beverwijk; J. C. T. Kwak, Vlaardingeng; F. v/d Oudewetering, Amsterdam.

Filmstrio

kun koloraj bildoj pri Esperanto libro.

Laŭ iniciato de nia membro S. ro R. Slot, prezidanto de nia sekcio en Zeist, S. ro J. S. van den Nieuwendijk en Zeist kompilis koloran filmstrio laŭ la libro „Martin Krpan”, verkita de Fran Levstik. La nederlandan tekston kompilis S. ro J. Slot kaj P. Enkelaar kaj la eldono estas nun en la katalogo de la filmejo „Fibi Beeldonderwijs”, Utrechtseweg 66-68, Zeist, Nederlando, sub la numero kaj titolo: No 214, „Martin Krpan”, (Een Sloweens Volkssprookje). La kostoj de la strio kun 30 bildoj kaj teksto estas gld. 12,50.

kompreno pri tiu evoluo povas helpi en la serĉado al la eblo krei novan internacian lingvon. Kiel ajn interesa tiu prelego estis, ni ne povas diri ke ĝi vere tuŝis la problemon de la

(daŭrigo p. 8)

Komunikoj de la ĉefestraro

P. J. HOOPE †

La 11-an de junio mortis unu el la plej fervoraj membroj de nia asocio, s-ro P. J. Hoope, prezidanto de nia sekcio Leiden. Li estis ĝisosta esperantisto, kiun oni povis renkonti en multaj naciaj kaj internaciaj kongresoj. Estante unu el la malnova gvardio, li entuziasme favoris la pacan idealon, kiu regis ĉe la malnovaj esperantistoj. Lia hejmo ĉiam estis la centro, kie li kaj lia edzino kore akceptis ĉiun samideanon, kaj kie ili kreis la veran esperantistan spiriton.

S-ro Hoope jam antaŭ la jaro 1925 gvidis grupon en Leiden, kiu poste fariĝis sekcio de L.E.E.N. De la jaro 1930 li estis ĝia prezidanto, kiun funkcio li plenumis ĝis sia morto. Dum multaj vintroj li gvidis kursojn, kaj tiel disvastigis nian internacian lingvon inter multaj homoj.

Li estis simpla, humila homo, kiu laboris nur en sia loĝloko. Multaj L.E.E.N.-anoj, kiuj iam vizitis Leiden scias, kiel li fieris pri sia urbo kaj kun kiaj fervoro kaj entuziasmo li povis gvidi ilin tra ĝi.

Krom sia prezidanteca funkcio li estis dum dekoj da jaroj delegito de U.E.A.

Ni ne plu vidos lian karakterizan barban ridetantan vizaĝon kaj laŭ lia humila karaktero, la enterigo okazis tre simple, nur en ĉeesto de la familiaj kaj sen ia ceremonio.

Al lia edzino kaj parencoj ni prezentas niajn sincerajn kondolencojn. Estu konsolo por ili, ke ni malhavos lin samgrade kiel ili.

Postmorte ni dankas lin tutkore pro ĉio, kion li faris en la interesoj de la movado kaj de L.E.E.N. Li estu ekzemplo por ni ĉiuj kaj ripozu pace.

El niaj Sekcioj

Groningen. La 25-an de majo 1956 S. ro W. P. Selis, membro de nia sekcio en Groningen festis sian 80-an naskiĝtagon kaj pro tio la groninga klubo jam la 24-an aranĝis specialan kunvenon en bele ornamita salono. La prezidanto, S. ro H. Behr skizis en sia parolo al S. ro Selis, ties vivon kaj precipe tion, kion li faris por la groninga esperantista klubo. Multan scion pri esperanto-la klubanoj dankas al S. ro Selis, kiu ĉiufoje en kunveno havas iun amuzan historion aŭ anekdoton per kiu li instruas la gramatikon en maniero, kiel nur li povas tion fari.

Lia instrumaniero kreis eĉ novan verbon „selisumi”. La prezidanto finis sian parolon esperante, ke la jubileanto ankoraŭ dum multaj jaroj povos ĉeesti la kunvenojn kaj por honorigi lin la klubo nomis S. ron Selis honora membro de la klubo kaj donacis al li la libron „Originala Verkaro” de Zamenhof.

FLANDRA KRONIKO

(daŭrigo)

la ĝusta vorto. Efektive ni havas ne nur Flandrojn sed ankaŭ Brabantanojn kaj Limburganojn. Estas rimarkinde ke la landlimo inter Belgujo kaj Nederlando iras meze tra tiuj tri regionoj tiel ke ambaŭ-flanke de la landmilo loĝas anoj de tiuj tri popolpartoj. Estas nur depost la 15a jarcento ke la Provincoj kiuj nun formas Belgujon kaj Nederlandon havas kunan vivadon. Antaŭe ili estis apartaj Graf-kaj Duklandoj. Tiuj Graf-kaj Duklandoj formiĝis en la naŭa kaj postaj jarcentoj. Je iuj tempoj ili estis tre vastaj. Flandrujo ekzemple etendiĝis en la 10a jarcento ĝis sube de la franca urbo Amiens. Ĝi tenis pli da Francparolantoj ol Flandraparolantoj. Iu nacieca spirito aŭ konvinko tiam ankoraŭ ne ekzistis, escepte de kelkaj kleruloj kiel la poetoj Jakoboj Van Maerlant (13a jarcento) kaj Boendale (iom pli poste). La provincoj, eĉ la urboj estis malamikaj unu al la alia. En la 15a jarcento, la Burgundiaj Dukoj (Filipo la Hardita, Filipo la Bona, Karlo la Maltima) sukcesis teritorie unuigi la Nederlandajn Provincojn. Je la fino de la 16a jarcento tiu regno dividiĝis en du partoj. La Norda rapide atingis sendependecon. La suda parto konis sinsekve hispanan, aŭstran, kaj francan superregadojn. En tiuj jarcentoj la du partoj kompreneble tre malsimile evoluis. De 1815 ĝis 1830 ili denove estis kune sed en tiu lasta jaro formiĝis aparta Belgujo.

Belgujo nombras ĉirkaŭ 8,5 milionojn da enloĝantoj el kiuj ĉirkaŭ tri kvinonoj estas „Flandroj”.

Drs. F. R.

Albrecht Rodenbach (1856—1880)

Kiel Zamenhof estas nedisigebla ligita al la Esperanto-movado, tiel Rodenbach (ch elpar.: ĥ) al la Flandra movado.

Laŭ la konstitucio de 1831 (la Belga ŝtato ekzistas depost 1830) estis libereco de lingvo-uzo. Libereco ne signifas egaleco. Fakte estis nur unu oficiala lingvo: la Franca. Tiel ĉio estis Franclingva: la instruado, la jurpraktiko, ĉiuj oficialaj komunikoj, surskriboj ktp. Tuj ekestis movado por revalorigi la Flandran lingvon. La Bruĝa pastro-poeto Guido Gezelle (1830—1899) per siaj poemoj kaj multaj kleruloj kiel Snellaert k.a. per siaj studoj pri Flandraj literaturo kaj historio vekis intereson kaj amon por la gepatra lingvo.

Rodenbach estis la viro kiu enpenetrigis la Flandran movadon en la Katolikan studentaron. Li studis en la kolegio de Roeselaere. Tiu movado

Flandra Ligo Esperantista.

Prezidanto: Gerard Debrouwere, Magdalenastraat 29, Kortrijk.

Sekretario: Maertens G., Pr. Leopoldstr. 51, St.-Kruis, tel. 33445 (dum la ofichoroj).

Kasistino: F-ino J. Terrijn, Raapstraat 74, Gent.

Biblioteko: E. A. Koot, Joh. de Meesterstraat 12, Utrecht (Nederland)

U.E.A. peranto: Dr. F. Couwenberg, Koninginnelaan 14, Blankenberge P.C. 4161.35.

Redakcio F.E.: Drs. Fern. Roose, Ste. Klaradreef 59, Brugge.

Koresponda kurso: H. Pirennelaan 25, Gentbrugge.

estis malpermesata kaj ĝiaj anoj devis agadi en sekreto. Estis la romantika periodo: sekretaj kunvenoj nokte en anguleto de la dormejo; kajeretoj kun artikoloj pri la historio kaj la literaturo de Flandrujo estis sekrete disdonataj inter la studentoj. Rodenbach mem verkis multajn kantojn kaj teatraĵojn. Kompreneble foje devis eksplodi io. Tio okazis dum la festo de la Rev. Pastro Superior (estro). Delbar de la kolegio. Ne estis vera festo. Ekzistis konflikto inter la Superior kaj la studentoj kiuj ne volis kanti Franclingvajn kantojn. Alvenis la vespero kaj la tradicia vespermanĝo sub la arboj (: la super champêtre). Unu el la profesoroj, la Rev. Pastro Deprez, por krei iom da gaja sfero, komencis kanton: „Les Cuirassiers” (la kirasuloj) kaj la studentoj devis kanti la rekantaĵon: „Çar ils sont cuirassiers” (ĉar ili estas kirasuloj). Sed tiuj netaŭguloj tuj trovis konvenan ŝanĝon kaj kantis: car nous sommes cuits assez. (ĉar ni estas sufiĉe kuiritaj — ne eblas doni en Esperanto la samsonecon, de la du Francaj frazoj). La Superior forkuris kolerega; la studentoj kantis la „kanton de la Flandraj Filoj” (het lied der Vlaamse Zonen); estis kompleta revolucio! La unua viktimo falis: Julius De Vos estis forsendata el la kolegio. Je lia honoro Rodenbach verkis la poemon: la unua martiro. Tiu studento iĝis poste Katolika misiisto. Nekalkulebla estas la nombro de studentoj kiuj depost tiam kaj ĝis nun estis forsendataj el la kolegioj pro ilia Flandra idealo. Post mezgradaj studoj, Rodenbach iris al la universitato de Loveno. Ankaŭ tie li estis la gvidanto de Kat. Flandra Studenta movado. Pli liberaj ol en la kolegio, ili kuraĝis malkaŝi siajn profundajn pensojn kaj laŭte proklami ke la celo devas esti la neniigo de la Belga ŝtato. En Loveno li iĝis grave malsana. Reirinte hejmen li tie mortis en la 24a jaro. Kvankam tre juna, li verkis tre multe kaj paroladis oftege pri la Flandra idealo. Lia naskiĝurbo stariĝis monumenton por li. En tiu-ĉi jaro universitata profesoro D-ro Frank Baur prizorgas kompletan reeldonon de la Rodenbach-verkajoj en tri volumoj. Ĉie en Flandrujo dum tiu-ĉi somero okazas rememorfestoj. En Roeselaere ankoraŭfoje, granda his-

Grupa Vivado

„Paco kaj Justeco” Brugge

Sinds ongeveer een maand gaan wij weer naar Ryckelveide de Zaterdagnamiddag en de Woensdagavond om in groep de Volley-Ballsport te beoefenen. Nog steeds blijft de kamp tussen de jongeren en de ouderen hard en onbetwist. Wij zullen hier niet verder op ingaan want het blijkt voor de beide partijen onmogelijk om in die twistzaak objektief te blijven!

Onverminderd gaan de groepsvergaderingen voort. Alleen één parolado moest altijd maar weer uitgesteld worden.

Er zijn weer een paar geboorten in de groepsfamilie: wat zal dat een jeugdgroep worden!

Henriette en Fernand; Germaine en Grégoire; Julienne en Jozef; hartelijk proficiat. Uw voorbeeld sterkt ons!

Onze deelname aan het kongres had talrijker kunnen zijn. Maar ons optreden daar is, geloof ik, weer best meegevallen. Vooral de schets „La Gazeto” had reuze succes. Proficiat aan de scheppers ervan André Dumarey en Grégoire Maertens. Ook een proficiat aan de beginnelinge Simone De Koninck. Verder dank aan degenen die nu, zoals in het verleden weer het hunne er toe hebben bijgedragen om ons kongres te doen slagen.

Onze zomeractiviteit gaat voort met o.a. een voordracht met filmen en lichtbeelden over de oudheid en de komst van de Nieuw-Zeelandse pionier Bertram Potts.

NI GRATULAS

En la hejmon de nia sekretario S-ro Grégoire Maertens naskiĝis 4a infano, 4a filo. FRANK.

Ni kore gratulas la kuraĝajn kaj feliĉajn gepatrojn.

toria sekvantaro je la 1a kaj la 22a de Julio; kaj giganta plenaera vespera teatraĵo je la 1a, 8a, 11a, 15a, 21a kaj 22a de la sama monato.

Rilate al la pozicio de la Nederlanda lingvo en nia ŝtato, ni certe ankoraŭ ne ĉion atingis; sed jam tre multe. Tion ni dankas al la laborego de multegaj oferantaj Flandraj idealistoj. Ankaŭ la mallonga vivo de Albrecht Rodenbach estis plenplena kaj riĉega.

Johann Martin Schleyer

Pro la 125a datreveno de lia naskiĝo la 18an de julio.

La kvereloj inter esperantistoj kaj volapükanoj apartenas nun al la pasinteco. La „fuŝa romana dialekto“ Esp. montriĝis taŭga lingvo supera al Volapük nun tute senviva kaj ni povas nun agnoski, kiel nia Majstro jam en 1908, la genion de Schleyer kaj la grandecon de lia verko: „En Germanujo, nur dank' al la ne forgesbla granda merito de Schleyer, nia ideo ricevis sian unuan disvolvigon kaj la unuan puŝon antaŭen.“ Neniam kontraŭbatalis la Majstroj, sed nur fanatikaj anoj. Grandioza atesto pri tio estas la letero de Schleyer al amiko: „Mi volis akceptigi ne mian Volapük, sed tute ĝenerale la ideon de mondlingvo. Se iam pereos mia sistemo, ĝiaj anoj aliĝu al sistemo pli bona aŭ sukcesa!“ Jen lia testamento tiel simila al la Zamenhofa modesteco.

Lia vivo

La 18an de julio 1831 en Oberlauda (proksime al Würzburg) naskiĝis la unua el tri gefiloj al instruisto Johann Philipp Schleyer. Dekunujara la eta Martin ricevis lecionojn ĉe sia onklo en proksima Königheim en la latina kaj muziko. Poste li kapablis ludi dekse instrumentojn. Post la gimnazia tempo li studis teologion kaj filozofion en Treiburg gajnante la monon per orgenludo. Katolika pastro li iĝis en 1856 kaj estis sendita vikario al Baden-Baden. Tie, ĉe kolektejo de diversaj nacioj, li komencas lerni lingvojn svedan, rusan, gotan, ĉinan kaj rumanan unu post la alia. Li konfesis, ke li sin okupis dum sia vivo pri 88 diversaj lingvoj kaj dialektoj. En 22 el ili li verkis.

Nun li estis pastro en kelkaj vilaĝoj apud la Lago Konstanca, malproksime de la hejma tero. Kuraga ago dum la Bismarcka kulturbatalo al li havigis kvarmonatan malliberon. Grupo de Pratikoliki sin estis apartiginta de l'papismo kaj dum enterigo de tia praktikoliki, Schleyer ĉirkaŭis la sonorilan frapilon per ŝtrumpoj por ke la sonoriloj ne povu aŭdiĝi. En fortikaĵo Rastatt li lasis kreski barbon, kiun li konservis sian tutan vivon kiel memoraĵon.

Post tiu epizodo sekvas la plej feliĉa kaj bela parto de lia vivo en la urbeto Litzelstetten ĉe Konstanz, kien li transloĝis en 1875. Idila kaj pitoreska loko konvena al poeta animo, vido al la bela lago kaj freŝaj arbaroj. Kaj la pastraj devoj lasis tempon al verkado kaj pensado. Neniam plu dum tiu tempo lin lasis la penso pri mondlingvo. Dum unu du jaroj li formis sian Volapük, unue nomitan „Pantiglossia“, kio estas la greka traduko. Li publikigis ĝin en 1879 kaj tuj sendis ĝin al la filozofiaj fakultatoj de ĉiuj eŭropaj universitatoj. Oni povas aserti, ke entuziasma estis la akcepto. La populareco de Schleyer kaŭzis, ke la projekto eniris ĉiujn klasojn de la popolo. Estiĝis vera popolmovado. Amasaj kursoj. Kongresoj en Friedrichshafen (1884) kaj Munkeno (1887). En aŭgusto

1887 partoprenis delegitoj el 30 ŝtatoj. Laŭ la protokolo oni konstatis milionon da anoj, 300 klubojn, 1600 ekzamenitajn instruistojn.

Sed jam minacas la pereco, ne per ĵus naskita Esperanto male ĝia ĝermo kuŝas en la lingvo mem. La aŭtoro aperigis sian lingvon ne matura aŭ kompleta jam post paso de unu-du jaroj, dum ke en la zamenhofa menso la mondlingva ideo fermentis preskaŭ 20 jarojn. Schleyer intencis, tuj fondi akademion de volapük, sed ĵa pruvigis vera la opinio de Zamenhof: Kiel poemon ankaŭ lingvon ne povas verki komitato. Ĉar nun ĉiu volapükano tuj proponis plibonigon ja ofte rajtigitan kaj laŭ germana proverbo multaj kuiristoj fuŝis la kaĉon. Mankis la normo, kiu estis por Esperanto la Zamenhofa stilo. En aŭgusto 1889 la volapükkongreso montris la nehaltigeblan disfalon de tiu lingvo. Tamen Schleyer senlace provis plu savi ĉion saveblan. Sed la manko je financaj rimedoj malhelpis la aperon de nova gramatiko, nova reordigo de la lingvo kaj movado.

Schleyer estis transloĝinta al Konstanz en 1803 post sia regzigno pri la pastra ofico. Poste donacis liaj amikoj modestan dometon en la Schottenstrato 3, kie li pasigis sian viv-vesperon. Eĉ nun ne ripozis lia senlaca menso. Estas ja ero de la ŝvaba animo okupiĝi kaj pensi pri ĉio. Li dediĉis sin al siaj ŝatokupoj astronomio kaj medicino kaj trovis tre atentindan muzikan legon. Li proponis novajn plibonigitajn notskribon kaj blindulalfabeton.

Granda ĝojo estis por li, kiam en 1894 Papo Leo XIII lin eknomis Papa Sekreta Cambelano. Estis la 16a de aŭgusto 1912a kiam la morto forprenis la plumon el la diligenta mano.

Ĉiuj senluziigoj ne povis senigi lin de la kredo al la venko de liaj ideoj. En la tombon li kunprenis ĝin. Kaj li pravis. Hodiaŭ la Esperanta lingvo atestas pri Schleyer same kiel pri ĉiu alia pioniro kaj nia fiera movado ĉiam rememoru, ke sen li ĝi ne estus povinta ĵeti siajn semojn en grundon jam plugebligitan iomete. Ni ekzemple ne forgesu, ke la unua grava Esp-organizo Nürnberg kun la „Esperantisto“ estis la Volapükklubo konvertiginta al Esperanto.

La lingvo

Estas multaj paraleloj kun Esp pruvantaj ke alia solvo ne eblas. Volapük havas la samajn sonojn, krome ä, ö, ü, c (= ê), j (= ĵ), q (= ĥ), y (= ĵ), x (= ks), z (= c). La akcento estas sur la lasta silabo. Artikoloj ne ekzistas. La demanda vorto li- respondas al ĉu, la vorteto no al ne. La verbajn tempojn oni indikis per antaŭigataj vokaloj: älab-: havis; elab-, ilab-: estas, estis havinta; olab-: havos ktp. Deklinacion oni faris per: vola - de la mondo, vole - al la mondo, voli - la mondon. Pro tio necesis, ke ĉiuj vortradikoj nek ko-

IOM KAJ TIOM

*Ĉu povas iom, iom, iom
vi min ami?*

Iom ekflami en amo por mi?

*Ĉu povas iom, iom, iom
mi eldiri,*

*— Nenio por miri! —
la amon por vi?*

El kompatinda kor'

trankvilo fuĝis for.

*Doloras tiom, tiom, tiom
mia koro!*

*Ah, kara karulin',
vi resanigu ĝin.*

*Ni ĝojos tiom, tiom, tiom
en belhora.*

P. E. Teto

menciĝis nek finiĝis per vokalo. Schleyer ofte devis kripligi la vortojn ĝis komplete nekoneblo: nim-animalo, niver-universitato, spod-korespondo.

Do jen la esenca diferenco: Dum ke Zamenhof alcelis plej fortan similecon kun la ekzistantaj okcidentaj lingvoj Schleyer serĉas mallongecon, metodecon, kvazaŭ stenografian lingvon. Plej volonte li havis triliterajn vortojn kaj tial li multfoje devis, por eviti samajn radikojn, elekti ilin el tute nekonataj lingvoj aŭ eĉ tute arbitre kiel la numeralojn ekzemple, kio tre malfaciligas ilian memorigadon.

Tamen kie vere necesus metodeco kaj konsekvenco, ĝi mankas. Oni ne konas afiksojn kun precize definitaj signifoj. Ja estas cento da ili, sed nur por uzo de l'aŭtoro, kiu arbitre ilin aplikas ĉe la kreo de nova vorto. Oni povas diri, ke la sistemo de vortfarado, kiu tiel helpas la esperantiston, ne estis evoluinta en Volapük.

Same necese estis, kiel Esp. montris, ke la verboj indiku la personon. Kaj pli da detaloj:

-S signifas pluralo, adjektivo finiĝas per-ik kaj adverboj per -(ik)o. Aldono de -um signifas komparativo, de-ün superlativo, de -öv verba kondiĉa modo. Verbo komenciĝanta per p- signifas pasivo. Kaj mallonga teksto:

Menade bal püki bal
Sis yels teltum tikäl menik
steifom püki kel kanom
palenadön e pagebön fa nets
valik demü nefikul oka.
Melak lölik bevü nets difik
Lio vemo panefikulomöv, if
pük sibirnom-la, keli anim,
nen sesum, kanom lenadön
nes mütön vitimön mödi tima.

Al unu homaro unu lingvon
Ekde ducent jaroj la spirito homa
aspiras lingvon kiu povas
esti lernata kaj uzata de nacioj
ĉiuj pro la facileco de si.
La trafiko tuta inter nacioj diversaj
kiel multe estus faciligata, se
lingvo ekzistus, kiun ĉiu,
sen escepto, povas lerni
sen devi oferi multon da tempo.

Pietro Bisvan

41-a Universala Kongreso de Esperanto

Kopenhagen — Danlando
4/8 — 11/8 '56

Laŭ la lasta oficiala komuniko la nombro de partoprenantoj ĝis fino de majo estas 1983 el 38 landoj (pasintjare 1494 el 34 landoj.)

Abonantoj. Esperantistoj, kiuj ne aliĝis al la U.K. tamen povas ricevi la kongresajn dokumentojn (1-an kaj 2-an bultenojn, kongresan libron kaj insignon kaj specialan „abonantan” karton) paginte la sumon de d.kr. 15,— al U.K.

Anoncis sin ankoraŭ jenaj fakunuiĝoj:

Framasonoj, S.ro Holger Starke, Lykkesholmsalle 31, Kopenhagen, Danlando.

Int. Federacio Esperantista Fervojista, ĉe S.ro J. Lok, Orteliusstr. 108 III, Amsterdam W., Nederlando.

Socialdemokratoj, ĉe S.ro Aage Benne, Sandbygaardvej 34, Kopenhagen, Daniando.

Akceptoj: Limigita nombro de kongresanoj povas viziti: la reĝan porcelenan fabrikan; la ĉefsidejon de la kooperativa movado; Meblofabrikan.

Bibliografio

DIALEKTO, DIALEKTIKO. De DELFI DALMAU.

Barcelona, 1955. 88 p., broŝ.; 12 x 16; prezo ne indikita.

Sub tiu iom sfinksa titolo la aŭtoro kolektis aron da artikoloj, parte jam aliloke aperintaj, pri diversaj Esperanto-problemoj. Per simpla, klara rezonado, nedetruibla optimismo, profunda amsento al la homaro li volas plueduki la nuntempan esperantiston, lin sekure gvidi tra la embuskoj de kontraŭstaro kaj atakoj, de senkurajĝoj kaj elrevido, por senrevene lin envicigi inter la pacaj batalantoj por tuthomara interfratiĝo.

Ĉe la legado la tuŝitaj temoj verdire ne impresos kvazaŭ novaĵoj, sed pli ĝuste kiel iamaj konatoj kies trajtoj pli kaj pli malpreciziĝis en la memoro kaj kiujn oni ŝate retrovas.

Kiel profesoro pri fremdaj lingvoj li plenmane ĉerpas el propraj spertoj la konvinkon, ke poliglotoismo en sia nuna formo estas ĉiurilate malprofitiga. Dum Esperanto kiel dua komuna lingvo minimumigas la poliglotoismon kaj tiel fariĝas la plej konvena solvo por lingva interkomprenado. Sentante, kiel kataluno, ke se ne ekzistas interlingva justeco kaj samrajteco ankaŭ ne povas ekzisti pacamo, li facile komprenigas, ke malantaŭ la tiom laŭde rekomendita angla-franca dulingvismo sin erarige kaŝas avantaĝa unulingvismo kun politika su-

Vivanta Kaliero

*Ĉi koloĉena tuŝo denove min sugestas
Pri iluzio, rava revofest’.
En la juvelo, kura bildo nestas
Ĝis revekiĝ’ dam ornamenta gest’.*

*El ĝia per la vico ektrilas ĉiu gemo,
Por mia koro sona revmuzik’,
Paroltrezor’ treĉita per fadeno,
Diranta ĉarmofrazojn de l’amik’.*

*Ho la miraga bildo! La ĉirkaŭanta ŝnuro
Sorĉigas nun vivanta brakopar’:
Sin kurbas jam amata virfiguro,
Amantvizaĝ’ por nova amdeklar’.*

*La ŝnuron fermisigelo ja splisas kolodote,
Karesavanco al anima kis’.
Mi amas vin, finflustras lipidrolote
Ĥimer-amant’ sur mia gorĝa niĉ’!*

*Por la tioma fojo la iluzio svenas
Kaj rea fasto venas post la fest’,
Kaj ree l’juvelbild’ vualmienas
Ĝis resklariĝo pro nur simpla gest’.*

Anna Meurrens

pereco por unuj, dum la aliaj senesperige enmariĝas en peza dulingvismo. Kiel polemikisto li refutas la riproĉojn, ke Esperanto estas artefarita kaj ne spontanee evoluinta lingvo, ke ĝi ne estas absolute perfekta nek matematike logika. De la saĝa Akademiano venas la konsilo pri singardo kaj toleremo. Egaldistance de senindulgaj konservativuloj kaj tro-riskemaj novigantoj li konsentas, ke la lingvaj bezonoj de ordinaraĵoj homoj kaj de literaturistoj aŭ fakuloj ne estas samaj. Sed ĉiuj trovas sian vojon en Esperanto sen ia danĝero por la unueco de la lingvo, kondiĉe ke ili lasu sin inspiri de la ekzemplo de la genia kreinto de Esperanto, kiu plej bone konas ĝian spiriton. Ĉar „pura Esperanto ne ekzistas, kiel ne ekzistas pura germana lingvo, ĉi tiun konsistigas senfina germana dialektaro, kiel Esperanton senfina Esperanta dialektaro”. Ĉiu matura esperantisto ja havas sian „dialekton” laŭ la senco kiun la aŭtoro donas al ĉi tiu vorto en la verketo: ĉiu uzas propran Esperanton, respegulantan lian propran personecon, Esperanton kiu, kvankam korekta, diferencas de ies alia korekta Esperanto. Guste kiel okazas en iu ajn nacilingvo.

Sed pli ol malvarme kalkulanta rezonanto Delfi Dalmau sin montras sentema homo, konsciante ke „homo agadas pli laŭ sentado ol laŭ pensado”. Plej varme li instigas al persistemo, entuziasma obstina persistemo, kondukanta al la venko de Esperanto, aŭ pli ĝuste: al la venko de la spirito de Esperanto. La nura lingva komuneco ja ne evitos militojn. Komuna idealo pri interhoma justeco pli efike unuigos ol komuna lingvo, pli celtrafe efektivigos la sopiratan interhoman amsenton.

Svarmas la propraj nomoj en la verketo, nomoj de politikistoj, filozofoj, pentristoj, nomoj de lingvistoj kaj literaturistoj esperant- aŭ nacilingvaj, nomoj de kolegoj-akademianoj kiuj distingiĝis per siaj klopodoj sur la tereno de la esperantologio. Kaj aliaj. Nomoj pri kiuj la ordinara leganto eble kaj kompreneble ne ĉiam estas informita. Eble li ĉerbumos pri la „komentoj de Downes” kaj la „rimarkoj de Manders” (p. 73) se li ne posedas la 17-an eldonon de Fundamenta Krestomatio aŭ ne legis la tiurilatan recenzon en „Espero Katolika”. Eble li neniam komprenos kion la aŭtoro volas diri per „dialektiko”. Sed multe tio ne ĝenos ĉe la legado, ne pli cetere ol la tro oftaj preseraretoj: gravas ja pli la faktoj kaj ideoj ol la nomoj.

Ĉiun ĉapitreton sekvas „paroliga demando por uzado en supera kurso de Esperanto”. Pri la taŭgeco de tiuj demandoj oni povus dubi, kiam ili ne rekte rilatas al la pritraktita temo, foje ili postulas pli da preta scio ol la granda plimulto posedas, foje ili celas malkaŝi pli intimajn sentojn ol oni emas publike eksponi.

Sed ankaŭ tio estas nur detalo. Pleje valoras la artikoloj mem, kaj la fortiga, entuziasmiga influo kiu ĉirkaŭkaptas la leganton. Kaj tio sufiĉas por ke la verketo meritu simpatian akcepton.

F. Couwenberg.

Novaj Faldfolioj

La Oficejo por Fremdultrafiko „V.V.V.” Rokin 5 Amsterdamo, Nederlando eldonis en esperanto belan ilustritan faldfolion pri la urbo kun plano pri la centro en kiu troviĝas la plej gravaj vidindaĵoj. Ĝi estas havebla ĉe la nomita adreso de la oficejo.

La informservo de Loetschberg-Fervojo eldonis belan faldprospekton pri la fervoja linio Bern — Loetschberg — Simplon (B.L.S.) en esperanto. La prospekto estas tre utila por tiuj, kiuj vizitante Svisujon uzas ĉi tiun elektran fervojon, kiu estas internacia ligilo inter nordo kaj sudo, Berna Oberlando — Valezo — Italujo. Ĝi estas havebla ĉe Informservo: B.L.S. Genfergasse 11, Bern, Svislando.

La Interŝtata Komitato por Eŭropa Migrado (I.K. E.M.) kies centra sidejo estas en Ĝenevo. Svislando, eldonis esperantlingvan faldfolion pri siaj estiĝo, evoluo kaj laboro.

La Asocio Internacia por Sociala Sekureco (AISS) rue de Lausanne 154, Ĝenevo, Svislando eldonis specialan esperantlingvan faldfolion grandformaton pri novaĵoj de la sociala sekureco.

La Internacia Labor-organizaĵo (I.L.O.) en Ĝenevo eldonis ilustritan broŝuron pri siaj taskoj kaj laboroj.

daŭrigo de paĝo 4

lingva diverseco kaj ties solvon, ĉar el lia konkludo klare montriĝas ke Prof. Schalk tute pretervidas la ekziston kaj funkciadon de Esperanto kaj do tute ne estas necese ankoraŭ serĉi la eblon por krei novan internacian lingvon.

Cetere ankaŭ el la prelegoj de aliaj parolintoj ne-esperantistoj nepre evidentiĝis ke ili nenion sciis pri la atingoj de Esperanto kaj pri pozicio ĉe la esperanta movado rilate al U.N.E.S.K.O. La reprezentantoj de la franca-angla dulingvismo fervore defendis ĉi tiun ideon kaj en tiucela kunveno estiĝis varma disputo pri la nocio, kio estas fakte vivanta lingvo. S-ro Pragano kaj Prof. Lapenna forte defendis la starpunkton ke ankaŭ esperanto estas vivanta lingvo kvankam ĝi ne estas nacia lingvo.

En alia kunveno Prof. Lapenna firme akcentis, ke lingvo estas socia fenomeno kaj povas ekzisti nur kiam troviĝas personoj aŭ grupo da personoj kiel granda aŭ malgranda ĝi estu kiu uzas iun lingvon. Esperanto estas uzata buŝe kaj skribe de multaj miloj da personoj en la tuta mondo kaj pro tiu fakto ĝi estas vere vivanta lingvo kvankam la uzantoj ne formas nacion en la ordinara senco de la vorto. Ankaŭ D-ro Roelofs parolis en sekcia kunveno en tiu direkto dirante ke la programero: Elekto inter artefarita lingvo kaj vivantaj lingvoj kiel kontaktilo inter la popoloj, ne estis ĝuste redaktita, ĉar laŭ lia opinio ankaŭ esperanto kvankam artefarita estas vera vivanta lingvo. F.ino C. M. Burger eksinstruistino pri la franca lingvo en knabina mezgrada lernejo substrekiis la fakton ke instruite dum 30 jaroj la francan lingvon al lernantinoj de la lernejo, ŝi ĉiufoje devis konstati ke la lernantinoj forlasis la lernejon ne povis bone kaj flue uzi la francan lingvon kaj ke per esperanto ŝi havis en multe pli mallonga tempo pli bonajn rezultatojn.

Resumante la ĝeneralan impreson, kiun ni post ĉi tiu kvartaga konferenco, akiris, ni povas konstati:

1e ke la plej granda parto de la ĉeestantaj lingvaj eminentuloj sciis nenion aŭ preskaŭ nenion pri esperanto kaj ĝia movado en la tuta mondo.

2e ke la uzo de la jam nomita trakusistemo, kiel ajn lerta estis la trakusistoj estis pli malpli fiasko, kiu krome certe kostis multan monon.

3e ke kvankam ĉeestis kaj parolis reprezentanto de interlingve nome S-ro M. A. Koning el Overveen, tiu lingvo tute ne estas konkuranto de Esperanto, ankaŭ dank' al la bona librostando, kiun aranĝis nia arnhema sekcio en la larĝa koridoro de la konferen-

LA STUDANTO

Jen la kompletigitaj vortoj de

Ekzerco 32 A:

1: Pavo; vosto. 2: pafu; pafilo; pavo; flugas for. 3: flugas; flugiloj. 4: Farmistoj; plugas; plugilo. 5: ekzerci; ekzemplojn. 6: vidas; fidi; vidas. 7: vidis; fidas. 8: vekis (nepre nek skribu nek elparolu f en la komenco de ĉi tiu vorto, ĉar tiam la vorto havas tute alian signifon); frumatene. 9: farmisto; varmo. 10: kardojn; kampo; kartoj.

Jen la ĝusta formo de la verboj de

Ekzerco 31 B:

1: banas. 2: krias; komenciĝas (oni komencas la banon, do la bano komene iĝas). 3: haltigi (infinitivo!); haltis (estinta tempo, ĉar ankaŭ „intencis” havas tiun formon); pafis. 4: eksplodis; krevis („krevis” estas netransitiva verbo). 5: haltigis; demandis; intencis mortigi (la rekta parolo estus: „Ĉu vi ĵus intencis mortigi min?”). 6: respondis; deziris haltigi (rekta parolo: „Mi ĵus deziris haltigi.”). 7: fumis („fumi” (= ellasi fumon) estas netransitiva; forgesis plu fumi la cigaredon („fumi” (= en- kaj elspiri tabakan fumon) estas transitiva; do „fumi” estas escepta verbo, kiu povas esti kaj tr. kaj netr.). 8: petis; montri. 9: montriĝis; estas (ne-rekta parolo!); povis daŭrigi. 10: enlitiĝis; dormis (kelkaj netransitivaj verboj povas havi objekton konsistantan en agsubstantivo farita el la sama radiko: dormi dormon; lukti lukton. Tiun dirmanieron oni nomas „etimologia figuro”).

cejo, la provinca domo.

4e ke oni kompreneble ne atingis definitivon solvon de la problemo, sed ke estas necese denove ankoraŭ pli detale studi ĝin, ĉar fakte pro manko de tempo oni ankoraŭ ne tuŝis la kernon de la problemo.

5e ke pro la fakto, ke oni multe diskutis pri tio, kiel plifaciligi la lernadon de fremdaj lingvoj, ĉu per la uzo de aliaj metodoj, ĉu per plisimpligo de la gramatiko, ĉu per pli malgrandigo de la necesa vokabularo, oni per tio tamen vole -nevole agnoskas la grandan malfacilecon de la lernado de fremdaj lingvoj.

6e ke ĉe venonta konferenco pri ĉi tiu temo Esperanto nepre devos ludi pli gravan rolon ol nun, ĉar je la fino de la konferenco post la parolado de S-ro Cseh kaj de S-ino Isbrücker montriĝis ke oni multe pli favore opiniis pri Esperanto ol antaŭe kaj tre certe kelkaj ĉeestantoj lernos Esperanton por pli profunde konatiĝi kun ĝi.

F. Weeke.

NOVAJ EKZERCOJ:

Ekzerco 33 A:

Elektu unu el la interkrampaj vortoj:

1: S-ro S. havis soifon kaj deziris trinki kafon (aŭ; ĉu) ion alian. 2: Li demandis sian edzinon, (aŭ; ĉu) ŝi ankoraŭ havas kafon. 3: Si respondis, ke li povas elekti kafon (aŭ; ĉu) teon. 4: Ŝi ne sciis, (aŭ; ĉu; ke) la teo estas varma (aŭ; ĉu) malvarma. 5: Ŝi demandis, (aŭ; ĉu; ke) li deziras la trinkajon varma (aŭ; ĉu) malvarma. 6: Li respondis, (ĉu; ke) ŝi ja scias, (aŭ; ĉu; ke) li pli ŝatas la trinkajon varma (aŭ; ĉu; ol) malvarma. 7: Ŝi diris, (ĉu; ke) ŝi dubas, (aŭ; ĉu; ke) la teo estas varma, sed (ĉu; ke) ŝi tute ne dubas, (ĉu; ke) la kafeo estas varma. 8: Li respondis, (ĉu; ke) li estas certa, (ĉu; ke) kafeo estas preferinda. 9: Ŝi avertis, (ĉu; ke) ŝi ne estas certa, (aŭ; ĉu; ke) tre varma trinkajo estas bona por la stomako. 10: S-ro S. diris, (ĉu; ke) li ne dubas, (aŭ; ĉu; ke) (lia; sia) stomako pli bone toleras varman trinkajon (aŭ; ĉu; ol) (malvarma; malvarman).

Ekzerco 32 B:

Elektu la ĝustan vorton el la interkrampaj:

1: La (kolorigisto; pentristo) prenis dikan (kvaston; penikon) por farbi la plafonon de la ĉambro. 2: La oficio havis du dikajn orkolorajn (kvastajn; penikojn) sur sia brusto kiel ornamajojn. 3: Beethoven (komponis; kompostis) naŭ simfoniojn. 4: En presejo oni devas (komponi; komposti) artikolon antaŭ ol (presi; premi) ĝin. 5: La membroj de asocio ofte forgesas pagi sian (kontribucion; kotizon) al ĝia kasisto. 6: Post milito venkita popolo devas pagi (kontribucion; kotizon) al la venkinto(j) kiel repagon por la difektigoj. 7: Tiu malnova konstruaĵo (ekzistas; konsistas) jam naŭ jarcentojn. 8: Ĝia planko (ekzistas; konsistas) el marmoro. 9: Post piko de muŝo li ekhavis en sia nuko suferigan ruĝan (karbunklon; karbunkolon). 10: Li donacis al (lia; sia) fianĉino belan, helruĝan (karbunklon; karbunkolon), kiun ŝi pli ŝatis ol la (karbunklon; karbunkolon) en (lia; sia) nuko.

Ekzercojn korektotajn gelegantoj sendu (kun poŝtmarko por resendo!) al la kompilinto de la rubriko: S. S. de JONG Dzn, Waltaweg 3, TJERKWERD bij BOLSWARD, Frislando, Nederlando.

Verantw. uitgever: Vlaamse Esperantisten-bond Ste. Klara Dreef 59, Brugge. Ned. Esperantisten-Vereniging LEEN, Pythagorasstr. 122, Amsterdam O, Drukkerij Krol, Hoofdstraat 29, Uithuizen (Ned.).